# PACO

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO N-o.7

N-o.29. Speciala eldono de LA PACDEFENDANTO - Ĉeĥoslovakio - Majo 1954

## PAROLAS ISLANDA PACBATALANTINO

Kompetentaj ekspertoj venis al la konkludo, ke per la nuntempa tekniko eblus grandskale pliigi la produktadon de la varoj por homa nutrado, domkonstruado kaj vestado, ke ĝi sufiĉus por la bonfarto de la tuta homaro. Sed hodiaŭ ĉiuj, kiuj atente sekvas la mondaferojn, scias kaj ekkonas, ke malsato, manko da vestoj kaj hejmoj kaŭzas grandskalan mortecon de homoj.

Tiu fatala fakto montriĝas al ĉi-uj, kiuj tenas la okulojn malfermitaj. Ili vidas, ke sovaĝuleco regas en la civilizita mondo, ke la riĉaĵoj kaj inventaĵoj estas tro utiligataj por malhelpi la evoluon. Oni uzas la teknikon por detruado de la vivo kaj beleco. Anstataŭ nutri, vivigi kaj kreskigi ĉion, kio suferas mizeron kaj vokas al justeco, la riĉaĵoj de la mondo estas uzataj por produktado de murdiloj, kaj la junuloj ekzercataj en ilia manovrado. La plej bona laborforto kaj kerno de la junularo estas okupata je la metio manipuli murdilojn. Oni trudas al la junuloj per militodevo, fari abomenindan kriman agon kontraŭ senkulpaj kunfratoj.

Oni faras kriman agitadon per libroeldonoj, artikoloj en gazetoj kaj ankaŭ per filmoj, por inciti homojn kaj provoki malpacon kaj malamikecan situacion kontraŭ sana reciproka interrilato. Oni injektas la venenon de malamo en la konscion de homoj. Oni kulturas malfidon kaj malscion anstataŭ informan instruadon por interkonatiĝo de la popoloj. Tiu fatala laboro de milit-provokantoj kaj kapitalistaj magnatoj, kiuj sin riĉigas per milito, estas la kaŭzo de la mizero en la mondo. Armilfabrikantoj estas danĝeraj malamikoj de la vivo. Incitanoj de milito estas tro potencaj en la mondo de tekniko. Pruviĝas preskaŭ neeble ĝustamaniere utiligi la teknikon dum tiaj malamikoj de la kulturo superregas ĝian evoluon.

La mizero kaj malsato neniam estos forigeblaj antaŭ ol oni finvenas al kompromiso pri interpopola paco kaj al la decido, ke la kapitalo, kiun oni nun uzas por detruado, estu uzata por moralinstruo kaj civilizado de la homoj, kiuj nun vivas en nescio kaj humiliĝa stato. Nur tiam estos eble satigi ĉiujn suferantajn infanojn de la tero. Tiam la tekniko kaj scienco komune helpos en konstrua laboro kiu servos al la vivo.

Por tio hodiaŭ laboras fortaj organizoj de pacdefendantoj en la tuta mondo.

Kion ni, la virinoj, povos fari por akceli la alvenon de la tago, kiam ĉiuj homidoj de la tero ekhavos pacon, vestojn, loĝejojn, manĝon kaj instruadon? La virinoj, kiuj ĝuas la feliĉon esti edukitaj en kulturo kaj libereco, kaj ĝuas laŭleĝan egalrajton kun viroj, povus fari netakseblan utilon al la mondo, levante sin kuraĝe kaj instruante al la viroj pli alte taksi la belecon kaj bravecon de la junularo anstataŭ preni la junulojn preskaŭ de sur la genuoj de la patrinoj por instrui al ili kaj devigi ilin praktiki mortigon de homoj, kaj tiel senhonorigi la belecon de la vivo. La virinoj devas unuanime leviĝi kaj komune protesti kontraŭ tia sovaĝuleco. La virinoj ja plifortigos sian tutmondan organizon, instigante unuj la aliajn laŭ impulso de la patrineco, de-

Zet. 01 - 5769-53

fendi siajn idojn. En plej multaj landoj la virinoj supernombras la virojn, tial estus facile por ili ĵeti tukojn sur la glavojn, kaj protesti liveri siajn infanojn por esti ekzercataj en detruado de homaj vivoj. Se la virinoj sukcesus en soci-kolektiva kunlaboro ili povus spiti la malamikojn de la vivo. Se la virinoj de ĉiuj landoj sukcesus unuanime kunlabori por la afero de la paco, ilia laboro havus grandegan efikon, kiu estus beno por la nuna kaj venonta tempo. Virinoj plej bone komprenas la malfeliĉegon, kiun kreas milito, kaj en multaj landoj ili spertis malsategon, doloran funebron, humiligon kaj malestimon. Tial ili volas per sia tuta forto kontraŭlabori la regantan sovaĝecon de la militismo en nia bela mondo kiu povas doni al ĉiuj ĝojon kaj abundon da bonaĵoj.

La virinoj devas unuiĝi al forta batalo kontraŭ la krimo uzi la riĉaĵon de la mondo por fari murdilojn por pereigo, kaj makuli la junulan belecon per sango kaj larmoj. Virinoj de ĉiuj landoj vekiĝos memkonsciigantaj pri sia devo postuli sian rajton, mem eduki siajn infanojn laŭ la evoluo de la vivo kaj beleco, por utila laboro en mondo de paco kaj libereco. La virinoj konscias pri siaj devoj kaj per unuigitaj fortoj ili faros miraklojn en la servo de la vivo, ĉar la forto de la amo superas la morton.

Viktoria Halldórsdóttir
prezidantino
de Virina Asocio por Paco k kulturo en Islando.

Tradukis: B.B.S.

REAKCIO ĈIE: supre, malsupre !

Kiam brue la fervojo
longe jam trafikon kreis,
tamen tiam "Scienculoj"
tian eblon akre neis.

Same kiam Esperanto
venis kun por ni valoroj,
mokis de antikvaj lingvoj
plenŝtopitaj profesoroj.

Ke nun Esperanto servas
plene jam en mondrilatoj,
tio ne registojn ĝenas,
pagas ĉion la regatoj.

Ankaŭ la popolo kulpas,
ŝafe kredas je aplomboj,
sed insultas la aliajn,
kiam ree falos bomboj !

J. Burger
Saarlando.

## A N D R E A   A N D R E E N

La 15. de aprilo estis dekorita eminenta batalantino por la mondpaco, d-rino Andrea ANDREEN, prezidantino de la Ligo de progresemaj virinoj en Svedio kaj vicprezidantino de la Internacia Federacio de Demokrataj Virinoj per la Internacia Stalin-pacpremio, por firmigo de la paco inter la popoloj.

En la "Sverdlov-salono" de Kremlo kunvenis la membroj de la sovjeta packomitato, de la komitato de pacdefendantoj en Moskvo, reprezentantoj de kontraŭfaŝismaj komitatoj de sovjetaj virinoj kaj junularo, kaj reprezentantoj de sindikatoj. Inter la ĉeestantoj troviĝis verkistoj, kulturaj kaj kuracistaj laborantoj, kiuj venis saluti sian kolegino n kaj nombraj reprezentantoj de ĵurnaloj.

La akademiano Skobelcyn transdonis dum brua, longdaŭra entusiasma aplaŭdo de la ĉeestintoj al doktorino Andrea Andreen diplomon kun ora medalo de laŭreatino de Internacia Stalin-pacpremio.

Ĉar Andrea Andreen, kvankam ŝi ne estas esperantistino, havas profundan komprenon por nia internacia lingvo, kiam tiu servas al la mondpaco kaj en tiu senco ŝi ankaŭ jam prezentis en la januara n-o. de nia organo artikolon al la esperantistaj pacdefendantoj, ni ĉiuj al ŝi okaze de tiu ĉi granda honorigo varme gratulas kun la sincera deziro, ke ŝi ankoraŭ longan tempon restu nia fidela kunbatalantino kaj kune kun ni ŝi transvivu en sano kaj feliĉo la finan grandan venkon de nia penoplena heroa batalo.

En tiu senco sendis la prezidanto de "MEM" en la nomo de nia movado salutleteron.

La redakcio.

KIAL DU CERBOJ ?

Kial portas kun fiero
ĉiu homo sur la tero
duan cerbon en la piro?
diras ofte mi kun miro.
De la cerboj la unua
eĉ jam estas superflua
por la homaj stultaj faroj
je si mem kaj je najbaroj!
Kie pensas mem popolo ?
Ĉu ne taŭgus por simbolo,
ke anstataŭ cerbojn du
portu homoj eĉ kun ĝu bovo-
kornojn ĉe la frunto j je la pezo
de ok funtoj [illegible]

## WESLEY ROBERT W E L L S

44 jaraĝa Négro el Kalifornio pasigis 25 jarojn de sia vivo en la tieaj malliberejoj pro sia batalo kontraŭ la diskriminacio kaj persekutado de nigruloj en Usono.

En letero,sendita el malliberejo, kaj publikita en progresema ĵurnalo „Daily Peoples World" rakontas W.R. WELLS pri turmentado kaj bastonado en la karcero,kiel la rasismaj gardistoj lin batégis per basebalstango ĝis senkonsciiĝo kaj insultis lin„nigra porko".

Post senĉesa turmentado,li foje tute ekscitita,ĵetis kraĉujon kontraŭ gardisto. Kvankam ál la gardisto tute nenio okazis,oni kondamnis lin al morto kaj anoncis la okazon de la ekzekuto en malliberejа gasejo de San Quentin je la 9.de aprilo 1954. Krom la multnombraj protestoj,kiuj ĉiutage estas sendataj al la kalifornia gubernestro, s-o.Knight,SACRAMENTO,Kalifornio, U.S.A.,ankaŭ la oficistoj de la Nacia Komitato en la urbdomo de PLZEŇ sendis aerpoŝte proteston kun jena teksto:

"Ni subskribitaj oficistoj de la urbo Plzeň/Ĉeĥoslovakio/ kondamnas plej akre la eldiritan mortverdikton kontraŭ la Negro Wesley Robert WELLS kaj postulas lian baldaŭan liberigon el la karcero.

Laŭ europa koncepto Wesley Robert WELLS faris nenian krimon.La akuzo, pro kiu li estis kondamnita al morto,absolute estas sen argumenta,ĉar lia batalo kontraŭ la diskriminacio kaj persekutado de nigruloj en USA nur estas justa afero por kiu batalus eĉ ĉiu Europano,sen vidi en ĝi krimon. Ja,male, ni vidas en la usona raso-teorio kaj Negro-persekutado la saman krimon kiel faris ĉitie Adolf Hitler kune kun siaj SS-viroj en Europo,kiam li,anstataŭ kiel ĉe vi Negrojn, persekutis,turmentis kaj en la gasejoj murdis la Judojn.

Laŭ niaj informoj,vi mem estas kompetenta eldiri pardonon en la kazo de WELLS. Pro tio ni urĝe apelacias je via konscienco,ke vi eluzu vian kompetencon kaj liberigu la senkulpan Negron Wesley Robert WELLS !

Sekvas subskriboj.

Similajn protestojn ankaŭ sendis la 31.de marto la laboristoj de la mondkonata Pilsena Bierfabrikejo, de Uzinoj"SKODA"/nun LENIN/,la Regiona Packomitato kaj aliaj.

La urbestro de PLZEŇ k-do.Šmolák mem telegramis sian personan proteston al la usona ambasadoro en PRAHA.

## TUTE SIMPLA PROPAGANDO

En multaj lokoj niaj anoj ne scias sukcesplenan metodon por varbi novajn adeptojn por Esperanto-kursoj. Niaj gek-doj en PLZEŇ/Ĉeĥosl./ praktikas la varbadon sen afiŝoj, sen flugfolioj aŭ alia publika propagando. Ili aranĝadas jene:

Ĉiu unuopa membro de la rondeto klopodas private inter siaj konatuloj varbi almenaŭ po unu kursano. La kurso komenciĝas eble kun nur 8 lernantoj,sed en la 3a aŭ 4a leciono la instruisto,kiu devas esti samtempe propagandisto,anoncas al la kursanoj komencon de vetkonkuro kun jenaj kondiĉoj:

Ĉiu kursano,kiu sukcesos varbi almenaŭ 5 novajn lernantojn kun samtempa pago de la kurs-kotizo,ricevos senpage lernolibron kaj vortaron,kiun li certe urĝe bezonos.

Al infanoj,kiuj kutime inklinas kolekti poŝtmarkojn aŭ fremdajn bildlibrojn,ni promesas poŝtmarkojn kaj bildlibrojn,kiujn al ni afable donacas niaj eksterlandaj gek-doj.

Kun la infanoj speciale,ni havis antaŭ unu jaro tioman sukceson,ke tion eĉ ekscias plialtaj instancoj kies interesoj estas aliaj,kaj malpermesis la propagandon de Esperanto en la lernejoj.

La infanoj preskaŭ ĉiuj,fariĝis fanatikaj amikoj de Esperanto,kaj ĉefe pro la belaj poŝtmarkoj kaj bildlibroj,kiujn ili havis eblecon en la vetkonkuro gajni.

Ni faras tiel,ĉar publika propagando en nia urbo ne estas ĝis nun permesata.

Provu tiun metodon imiti,kaj informu min pri viaj sukcesoj!

Rud.BURDA

## ENTOMBIĜAS EPĈ.

En la lasta n-o.la red.adiaŭis kun siaj legantoj kaj diras,ke la Fremdlingva eldonejo jam eldonas multajn nacilingvajn eldonaĵojn,kiuj estas pli preferataj ol la esperantaj/?/. La legantoj pli kaj pli malmultiĝis kio igis la red.de EPĈ.ĉesi la esplingvan eldonadon. - -

Ĉiu komento estas superflua !!!R.B.

## AŬSTRALIA PACDEFENDANTO

### vizitos Eŭropon

Fine de majo aŭ komence de junio venos per aŭstralia ŝipo al la itala haveno Napoli d-ro Ben CASS el Croydon-Park /Nova Suda Valeso/ por viziti Eŭropon.

D-ro.Ben Cass estas de longe aktiva batalanto por la mondpaco kaj progreso.Kiam ankoraŭ liaj tri filoj studis en universitato doktoron,li povis nur ne publike agadi. Nun lia lasta filo jam ricevis doktor-diplomon kaj Ben Cass estas libera.Li promesis fari prelegojn pri la aŭstralia pacmovado por kelkaj eŭropaj landoj.Samtempe li ŝatus interparoli en kuracistaj rondoj pri novaj kuracmetodoj kaj medicino.

Niaj k-doj en Italio estas jam informitaj pri lia alveno kaj preparas lian akcepton.Lia dua stacio estos Aŭstrio.En Vieno restos d-ro Cass 9 tagojn kaj forlasos la urbon la 18.de junio por viziti Ĉeĥoslovakion.En Ĉeĥoslovakio li vizitos sinsekve la urbojn Plzeň,Olomouc,Ostrava kaj la slovakan ĉefurbon Bratislava.*Pri lia vizito jam estis informita la ĉeĥoslovaka centra packomitato kun la propono, akcepti d-ron Ben Cass kiel honoran gaston de la landa packomitato.

Ĉar d-ro Cass ankoraŭ estas komencanto en Esperanto,li promesis rapide ellerni la lingvon por povi Esp-lingve prelegi.Ni esperu,ke li bone sukcesos,ĉar li jam kelkajn nacilingvojn parte regas.

D-ro.Ben Cass intencas viziti ankoraŭ aliajn landojn kaj speciale popoldemokratajn kaj Sovjetunion, sed por ĉiuj landoj li ankoraŭ ne starigis sian vojagplanon,kaj ankoraŭ ni ne estas certaj,ĉu li jam ricevis la necesajn enirpermesojn. Malgraŭ tio,ni jam proponis al li post Ĉeĥoslovakio viziti Hungarion Bulgarion,Romanion,Polion kaj Germanion,kaj de tie li povas viziti ankoraŭ aliajn kapitalistajn landojn.Ni kredas,ke lian vojagon tra popoldem.landoj financos la tieaj packomitatoj.Necesas,ke la esperantistoj pri tio jam nun zorgu kaj preparu ĉion por bona sukceso.Certe la popoldemokrataj esperantistoj povos multege profiti el la prelegoj de d-ro Cass ,se ili lerte la aferon aranĝos. La vizitoj povas okazi nur en 2-3 ĉefaj urboj de ĉiu lando.

Kontaktu pri tiu afero rekte kun k-do.Rudolf BURDA,Palackého nám.č.6,PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio.

*kaj Praha

## 3a TERURA BOMBO ATAKIS JAPANOJN

La 6an de marto malagrable superŝutis amaso da cindro japanajn fiŝboatojn dum ilia surmara laboro. La fiŝistoj,havinte neniun scion pri la deveno de tiu ĉi cindro,revenis al sia haveno kaj disvendis la akiraĵojn. Nelonge post tio la fiŝistoj malsaniĝis.

Kuracisto en hospitalo,kiu ekzamenis ilian sanostaton,konstatis,ke temas pri atommalsano.

Okazis teruraĵo.- Eksperimento kun hidrogen-bombo ĉe insulo Bikini,aranĝita de Usonanoj,kaŭzis novan malfeliĉon. Post tio laŭ esploroj klariĝis,ke la ŝipoj,fiŝistoj kaj fiŝoj,la fiŝojn manĝintaj homoj,kaj ĉiuj,kiuj rilatis la fiŝojn por transporti kaj aliaj.estis atakitaj de la radio-aktiveco.

Nun ni tutforte alvokas tion, ke „Nenie okazu plu tiel teruraj eksperimentoj en la mondo!"

Kita Satori

## NIA MOVADO EN BULGARIO

La 28.de marto okazis jarkunveno de la Esperanto-kooperativo en Sofia.Oni decidis,ke ankoraŭ en tiu jaro nepre eliru bulteno simila al la ĉeĥoslov.PACDEFENDANTO.Por efektivigi tiun deziron la sofiaj gek-doj denove regule kunvenados ĉiu marde je la 19.h.

Post alvoko,koncerne defendon de niaj japan.k-doj,kondamnitaj al mortpuno en la MACUKAŬA-afero kiun ili ricevis kun la lasta n-o.de la PACDEFENDANTO,ili sendis ankaŭ protest-leteron al la japana ĉefjuĝisto s-o.Suzuki.

Por subteni la klopodojn de niaj bulgaraj gek-doj,reorganizi la tiean movadon,necesas sendi al ili ĉiuspecan propagandan materialon,kiun akceptas por tiu celo: K-do.Petko P.ARNAUDOV, Bz.Miladinovi 75,SOFIA II.Bulgar.

KONTRAŬ HIDROGEN-KAJ ATOMARMILOJ

La 9.de aprilo okazis en Delhi granda kunveno,organizita de la tuthindia komitato de pacdefendantoj subtenanta la postulojn de malpermeso de produktado kaj uzado de hidrogen kaj atombomboj.La rezolucio prezentita de s-ino Rameŝvári NEHRU kaj unuanime akceptita de la ĉeestantoj konsistas el jena teksto:

„Tiu ĉi amaskunveno de loĝantoj en Delhi protestas kontraŭ plua produktado de hidrogen-bomboj kaj ceteraj specoj da amasmortigiloj.La rezolucio subtenas la postulojn por malpermeso de ĉiuj specoj da amasmortigiloj."

Parolis portanto de "Stalin-pacpremio,generalo Sokhey,parlamenta deputito,prof.Hirendra Nath,Gidvany eminenta hinda scienculo kaj parlamentano D-ro.Meghnád Saha kaj pluraj eminentaj personoj.

POR ĜENERALA MONDPACO

En kongreso de skotlanda sindikato, okazinta komence de aprilo,oni akceptis rezolucion postulanta la mal-permeson de atomarmiloj.La rezolucio alvokas la anglan registaron,ke tiu klopodu aranĝi interkomprenon inter Usono,Sovjetunio kaj Anglio por garantiigi generalan pacon.

La ekzekutiva komitato de Brita sindikato de ministoj,kiu reprezentas 700.000 membrojn ankaŭ postulis la malpermeson de atomarmiloj.

En la finnlanda urbo Wasa okazis publika kunveno de 700 personoj. El tiu kunveno estis sendita letero al la ĝen.sekretario de UNO sinjoro Hammarskjöld,postulante kiel eble plej baldaŭan publikigon de malpermeso de uzado de atomarmiloj kaj aliaj amasmortigaj armiloj kaj starigo de internacia kontrolo pri la atomarmiloj.

El RUDÉ PRÁVO de 13/4
tradukis Rud.BURDA

KONGRESO DE LA ĈEĤOSLOVAKA
KOMUNISTA PARTIO

La Centra komitato de la ĉeĥosl. komunista partio kunvokas la 10an partian kongreson je la 11.de junio 1954 al la ĉefurbo Praha/Prago/. La kongreso krom la organizaj aferoj donos direktivojn por starigo de nova ekonomia plano por 1955,por pli altigo de ekonomia produktado en la venontaj 2-3 jaroj,diskutos pri ŝanĝo de statutoj kaj elektos novan centran komitaton. Okaze de tiu kongreso certe estus dezirinda,ke niaj eksterlandaj gekamaradoj organizu amasan alvenon de salutleteroj kun esprimo de eventualaj deziroj kaj proponoj.Sur la leteroj notu"ESPERANTO" kaj sendu al: Ústřední výbor K,S.Č., P R A H A, Ĉeĥoslovakio.Ne forgesu doni kopion por nia redakcio.

GRAVA ATENTIGO!

En Ĉeĥoslovakio ankoraŭ pli ol 30 gekamaradoj ne pagis al k-do.Rud. Burda la jarabonon por "PACO"kvankam ili ricevis poŝtpagilon por sendi 10.-Kčs kune kun la numeroj de januaro,febr.kaj marto.Ĉar ni ricevas por ČSR nur ege limigitan kvanton da "PACOJ"kaj laste mankis al ni por 60 abonantoj,kiuj jam ĝustatempe pagis sian jarabonon la marta n-o,ni insistas petas tiujn gek-dojn,kiuj ankoraŭ ne pagis,ke ili afable resendu al k-do.R.Burda,Palackého nám.č.6 Plzeň,la jam ricevitajn n-ojn,aŭ ili rapidu ĉe li egaligi sian kotizon.

Alimaniere ni devus per tiu ĉi n-o.ĉesi la pluan alsendon.

INTERESA DISKUTADO

Por prikonsideri aranĝon de kontakto inter "MEM" kaj la organizo "INTERNATIONAL WAR RESISTERS" en Danlando,sendis nia dana peranto al la presidanto de "MEM" la statutojn de tiu organizo,en kiuj tiu kritikis la punkton:"Rifuzi partopreni ĉiun militon" kaj ricevis jenan respondon:

„Via diskuto pri la "IWR"-statutoj devigas min unue diri mem mian opinion pri tio.La IWR-anoj estas homoj,kiuj sentas,ke ili ne povas laŭ sia konscienco murdi homojn,kiujn ili nek konas nek malŝatas.Tiom longe,kiom ekzistos armeoj ankaŭ estos militoj.Estas egale ĉu oni nomas ilin defendaj armeoj aŭ ĉu ne. Neniu scias hodiaŭ por kio oni uzos la armeojn morgaŭ.Oni vidu la germanajn antaŭ la 2a mondmilito,la soldatoj pensis,ke nur estis por defendi la landon. Estas malfrue jam tro,por la soldatoj,protesti kiam oni ordonas al ili ataki alian landon, ĉar tiam ili nur devas obei,aŭ oni mortpafos ilin. Do oni devas rifuzi militon jam antaŭ ol ĝi venas.

En la Popoldemokratioj cetere ne

estas plia bezono por armeo ol če ni,en la t.n."kapitalistaj landoj", čar oni ĉi tie konsideras la popoldemokratiojn agresivaj kaj do ni devas pliarmigi por defendi kontraŭ tiuj.Tamen ni veraj pacifistoj rifuzas servon,ĉar ni scias, kiom malmulte efikas kontraŭbatali.Se ni kontraŭstaras,oni detruas ĉion,ĉiujn domojn,multajn senkulpajn homojn ktp. Se ni male ne batalas,la aliaj armeoj venas en nian landon.Sed neniuj domoj estos detruitaj,neniuj senkulpaj homoj estos mortigitaj.Cetere,se ni ne havas armeon,la alia lando ja ne povas profiti je veni ĉi tien kun siaj militfortoj,ĉar ili ja scias,ke ni ne estas agresivaj.Se unu lando tute senarmigus,certe baldaŭ sekvus aliaj landoj.

Do estas mia opinio,ke nek unu nek la alia de la grandaj potencoj havas agresivajn celojn.Tamen oni ne povas eviti novan militon, se oni ne ĉesas la militpreparojn ĉar la militservon kreas militamantoj,kiuj jam komencigos novan militon. Respondon je via diskuto al la statutoj de INTERNATIONAL WAR RESISTERS vi ricevos de ties presidanto,ĝis kiam la MEM-estraro donos al mi la rajtigon trakti kun li."

Willy Nielsen

Rimarko:

Mi volas diri,ke en la j.1939. ekzemple nia lando,Ĉeĥoslovakio, ne kontraŭbatalis la agresivan armeon de Adolf Hitler kaj tamen ne nur domoj,sed tutaj pacamaj vilaĝoj estis de tiu armeo detruitaj,kaj pli ol 25.000 da senkulpaj homoj murditaj en koncentrejoj kaj gasejoj inkluzive infanoj.

Ĉu ni ne lernu el tiu domaĝego kaj restu denove starantaj kun manoj enpoŝigitaj kiam okazus invado al nia lando,kiu absolute ne estas agresiva?

Rudolf Burda
pres.de "MEM"

## KIEL LABORI POR PACO PER ESPERANTO

Estus bone,se seriozaj esp-istoj komencus pensi pri tio,ke se ni volas,ke la registaroj rigardu la aferon serioze,ke ili devas eduki aliajn samideanojn kaj instigi ilin ke necesas uzi Esperanton ĉefe por seriozaj celoj. Kaj defendo de la paco vere estas serioza kaj tre dezirata.

Alois Zedník.

## „MIA PENSO ESTAS KUNIGI ĈIUJN"

Nia helpsekretario,k-do Gilbert en Francio senlace klopodas,konvinki la gvidantajn personojn de la internacia pacmovado pri la neceso akcepti la esperantistajn pacdefendantojn al kunlaboro. Al sia lasta letero,akompanata de abunda materialo pri la servoj,kiujn jam faras Esperanto por la mondpaco,kiun li sendis al s-ino. Eugene COTTON,la eminenta batalantino por la paco en Francio kaj membro de la estraro de la Mondpackonsilantaro,li ricevis jenan respondon:

"Kara amiko,

Mi sendas al vi ĉi kune la petitan artikolon.Ĝi bone spegulas mian penson,kiu estas kunigi ĉiujn,kiuj laboras por la paco,sur la diversaj kampoj.Mi ĝin verkis laŭ la Ĝenerala Kampo de la aktualeco.

Mi opinias,ke la dokumentoj, ĵurnaloj kaj flugfolioj/esperantaj/,kiujn vi sendis al mi tradukas la saman pensmanieron,kaj mi opinias,ke ĉiuj Francoj aliĝantaj al la Mondpaca Esperantista Movado devas partopreni/kaj interveni/ la diversajn lokajn kunvenojn de la franca porpaca movado. Iom post iom,ili konigos kaj ŝatigos ilian laboron,mi estas certa,kaj laŭ tiuj rezultoj oni elektos ilin por partopreni la naciajn kaj internaciajn renkontiĝojn.

Oni tute ne volas ignori vin, mi nun estas certa pri tio, sed apartenas al vi,esperantistoj,konigi viajn eblecojn al ĉiuj aliaj pacpartizanoj,kunigante vin al ili en la bazan laboron.

Tutkore al vi,

E.Cotton."

Jen denove klara respondo,kiun ni jam ofte akcentis.La esperantistoj ne povas atingi la fidon pli frue ol ĝis kiam ili sukcesos per faktoj montri sian sincerecon kaj aktivecon en serioza batalo por la defendo de la mondpaco.Kaj tian ni ankaŭ respektos aliaj.

"BULGARIO STARIĜIS ANTAŬ MIAJ OKULOJ KIEL FORTIKAĴO DE PACO"

Antaŭ kelkaj tagoj gastigis nia landa packomitato faman turkan ĵurnaliston Zekeria Sertel, membron de la Monda Packonsilantaro. Dum sia gastigado en Bulgario li interkonatiĝis kun ĝia pacmovado kaj kun la sukcesoj de nia pacama popolo sur la vojo de porpaca konstruado.

En sia parolado li interalie diris jenon:

"..... kelkajn tagojn mi estas en la bela ĉefurbo de Bulgario. Antaŭ ĉio ĉi tie min impresas la vasteco de la popola pacmovado kaj la profunda alligiteco al tiu ĉi movado. La duan tagon post mia alveno mi ĉeestis kunvenon de la landa packomitato. Ĉi tie estis kunvenintaj reprezentantoj de la packomitatoj el ĉiuj partoj de Bulgario. Inter ili estis ĵurnalistoj, instruistoj, verkistoj, laboristoj kaj kamparanoj. Ĉeestis ankaŭ la turka muftio kaj la reprezentanto de la turka minoritato Mjunjun Biljalov terkulturisto-tabakplantaĵisto, laŭreato dekorita de Dimitrov-distingaĵo/medalo/ ĉiu delegito rakontis pri ĉio, kio estas farata por la fortigo de la pacmovado.

De la donitaj klarigoj kaj elparolitaj vortoj evidentiĝis, kian grandan signifon atribuas la bulgara popolo al la pacmovado - ĉiu renkontita Bulgaro parolas por la paco kaj amikeco kun ĉiuj popoloj.

Kontraŭ tiu ĉi vigla aktiveco mi rememoras la malfortan porpacan agadon en nia lando kaj mia koro doloras. Bulgario stariĝis antaŭ miaj okuloj kiel fortikaĵo de la paco enmeze de la balkana duoninsulo.

Kial ni, la Turkoj, ĉiel postrestas en la pacmovado? Ĉu la turka popolo staras ekster tiu ĉi porpaca strebado? Ne! Male, la turka popolo deziras nenion alian ol vivi en paco. De jarcentoj la turka popolo vane elverŝis tiom multe da sango, kaj nun, ĝi havas nur unu penson - vivi trankvile en sia lando, neplu elverŝadi sian sangon por fremdaj interesoj.

Aŭ, ĉu en nia lando ne estas homoj, kiuj fariĝis esprimantoj de tiu ĉi porpaca deziro de la turka popolo por organizi ĝin en pacmovado? Estas tiaj homoj. Profesoro B. Boran kaj liaj kamaradoj fondis packomitaton, kiu fariĝis esprimanto de la porpaca volo de la turka popolo. Tiu ĉi komitato eldonis gazeton, kiun la turka registaro malpermesis kaj la komitaton ĝi arestigis, kondamninte ties anojn al 1 kaj 1/2 jara enkarcerigo. Post tio la turka registaro malebligis ĉiun revivigon de la porpaca movado.

Malgraŭ tio multaj adeptoj de la paco de tempo al tempo divers-loke kaj diversmaniere bravece esprimas la porpacan deziron de la turka popolo. Centoj da pacbatalantoj estas enkarcerigitaj nur pro tio, ke ili amas kaj deziras la pacon kaj havis kuraĝon sian deziron esprimi publike.

Pro tio, ni Turkoj, estis devigitaj fondi sian packomitaton eksterlande. Ni klopodas per tiu ĉi organizo esprimi la pacdeziron de la turka popolo kaj laŭtigi ties voĉon en la tutmonda pacmovado. Nia celo estas, defendi la sendependecon kaj pacon por nia lando. Nia organizo kunligas turkajn civitanojn de ĉiu profesio kaj politika koncepto.

Ne estas dubo, ke ĉiu Turko, adepto de la paco, en Turkio, al kiu estas kara la sendependeco de sia lando, deziras la pacon kaj estas je nia flanko. La porpaca afero estas afero komuna por ni ĉiuj. La unuiĝo de ĉiuj popoloj ĉirkaŭ tiu ĉi afero certigas la venkon de la paco.

Estas necese, ke la pacamikoj de Turkio kaj Bulgario unuiĝu kaj pli fortigu sian agadon, por plibonigi la najbarajn kaj amikajn rilatojn inter la balkanaj popoloj. Mi firme kredas, ke nia afero sukcesos, ĉar ĝi estas afero de la popoloj kaj tio, kion la popoloj deziras, frue aŭ pli malfrue venkas. "

El "Otečestven Front" /Patria Fronto"/

Tradukis peranto de "MEM" k-do: Borislav Angelev V E L E V

GOCE DELČEV, B u l g a r i o .

NIA JUNIA EIDONO APEROS EN ISLANDO

LA SOVJET-UNIO ALIĜIS AL UNESCO

La ministro por eksterlandaj aferoj de Sovjet-Unio V.M.Molotov sendis pere de la ĉefambasadorejo en Parizo al la ĝenerala direktoro de UNESCO L.Evans leteron, en kiu li sciigis,ke la registaro de S.U.decidis akcepti la programon de la Internacia Organizo de Unuigitaj Nacioj por edukado,scienco kaj kulturo,kaj komisiis la ĉef - ambasadoron en Londono,ke tiu en la nomo de la sovjeta registaro subskribu ĉi programon.La 21.de aprilo la ĉefambasadoro de S.U. en Londono J.A.Malik subskribis la programon de UNESCO.

Laŭ rap.el RUDÉ PRÁVO

Ĉar ankaŭ ESPERANTO troviĝas sur la programo de UNESCO kaj la venonta kongreso en Montevideo traktos gravajn demandojn koncerne ĝin,certe la esperantistoj povas vidi en tiu decido de la Sovjet-Unio bonajn perspektivojn kaj eventuale eĉ ŝangon de ĝia opinio koncerne la internacia lingvo.Komprenebla,tio tuŝus ankaŭ la ĝisnunan sintenon de la popoldemokrataj registaroj kaj ni esperu,ke baldaŭ large malfermiĝos la pordoj por ampleksa internacia interrilato kaj interŝanĝo de kul-turaj kaj literaturaj scioj.

La redakcio.

KONCERNE ABONOJ KAJ INFORMOJ

VIN TURNU AL NIAJ LANDESPERANTOJ:

AŬSTRIO:
K-do.Anton BALAGUE,Kirchenweg 12, SANKT PÖLTEN,
AŬSTRALIO:
K-do.S.BENNETT,62 Brighton Avenue, CROYDON PARK, N.S.W.
BELGIO:
K-do.Fr.DEBAENE,25 Av.des Naiades, WATERMAEL-BOITSFORT,
BRITIO:
Brita Esperantista Packomitato, 15,Twisden Road,Highgate Road, N.W.5. LONDON,
BULGARIO:
K-do.Borislav Angelev VELEV, Stalin-strato No.5,GOCE DELĈEV,
ĈEĤOSLOVAKIO:
K-do.František LIČKA, Březí č.12, OSTRAVA-Zábřeh,
DANLANDO:
K-do.Willy NIELSEN, Fynsgade 15, HJÖRRING,
GERMANIO:
K-do.Helmut LÖFFLER,Theaterstr.1, MITTWEIDA/Sachsen,
HUNGARIO:
K-do.D-ro.József KONDOR,Leánygim. Zrinyi u.18,SZOMBATHELY, kaj k-do Pál Balkányi,p.adr.Magyar Nemzeti Bank,Fiĉkiroda,BUDAPEST 54,
FRANCIO:
K-do.W.GILBERT, 44,rue Kléber, FLEURY-les-AUBRAIS,/Loiret/
ISLANDO:
Thorst FINNBJARNARSON,Gullsmidur-Njallsgötu 48,REYKJAVIK,
ITALIO:
K-do.Arnoldo OPISO,Via Assaretti 10, GENOVA 25,
JAPANIO:
K-do.MIJAMOTO Masao,ĉe KANSAI LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ, Nakacu - hamadoori 2-20,Oojodo-ku, OSAKA, kaj
K-do.Tugu KURISU,Himonya 2-2298, Meguro-ku,TOKIO,
SVEDIO:
K-do.Karl KVIST,Box 109a, DEJE,

Alilandaj gek-doj kontaktu rekte kun nia gen.sekretario,k-do. Anton BALAGUE,Kirchenweg N-o.12, SANKT PÖLTEN, Aŭstrio.

MUNICIO POR NIA BATALO

K-do.L.Przeczek-Dol.Suchá 5.-K.
K-do.J.Lička-Bohatice......10- "
K-do.Inĝ.Řebíček,Havl.Brod. 7.-"
K-do.J.A.Pátek,Bystřice p/H 5.-"
K-do.B.Přeliaš,Šumbark.....10.-"
K-dino.A.Valjanová,Galanta.10.-"
K-do.A.Csáder,Bratislava... 4.-"
K-do.Cyril Šlechta,Praha... 5.-"
K-do.E.Klimsza,Dol.Suchá... 2.-"
K-do.P.Trombik,Bohumín..... 5.-"
K-do.K.Bělohradský,Cheb....10.-"
K-do.A.Frantl,Opava........ 4.-"
K-do.V.Hejda,Nové Strašecí. 4.-"
K-dino.E.Kučerová,Skačany..25.-"
Soldato,Štefan Horák,Poprad10.-"
K-do.Alf.Kermel,Bohumín.... 5.-"
K-do.Al.Zmeškal,Praha...... 2.-"
K-do.Michal Szmigiel,Cheb..10.-"
K-do.K.Svoboda, Mlýny...... 6.-"
K-do.Il.Severa,Praha-Suchd. 4.-"

Ni elkore dankas al ĉiuj donacintoj en la espero,ke pluraj ankoraŭ sekvos ilian ekzemplon.

# LA PACDEFENDANTO

N-o.29. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO M a j o 1954.

## K L A R I G O

Ĉar ni ne povas eldoni samtempe nian propran landan organon kaj la organon de "MEM" kaj por kontentigi ankaŭ niajn ĉeĥoslovakajn abonantojn ni aldonas por ili almenaŭ tiujn ĉi du paĝojn en la espero, ke ankaŭ la abonantoj de "PACO" ĉi tiun aldonon akceptos.

## N I A M O V A D O E N Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

PLZEŇ, funkcias kurso por poŝtoficistoj kun 9 partoprenantoj. Gvidas k-do.J.Reiser rekte en la oficejo. Kurso kun 8 lernantoj funkcias en nia klubejo. Gvidas k-do.R.Burda.

BUDĚJOVICE, laŭ informoj de k-do.J. Ploss, la membroj de la klubo regule kunvenadas ĉiu semajne. Junularo ne tro interesas pri la movado.

BRATISLAVA, en Závod Mieru/Uzino de Paco/ funkcias kurso kun 10 komencantoj. Instruas k-do.J.Bayer. La grupo kunvenas regule ĉiu merkrede. K-do.Csáder, ekssekretario de SES, skribas: "ofte mi ricevadas leterojn de niaj iamaj membroj kaj mi neniam preterlasas okazon, instigi ilin al paclaboro. Plivigligo de la Esperanto-movado en Slovakio estas jam rimarkebla kaj mi kredas, ke ĝi rapide kreskos plue.

HULÍN, Ĉe k-do.Klimsza el Dolní Suchá ni mendis 25 lernolibrojn, kiuj disvendiĝis dum unu horo. La unua kunveno de interesuloj okazis la 15 de marto kun 20 partoprenantoj. De tiam ni regule kursas ĉiu marde de 15,15 - 17,15 horo. La 1.de majo fondiĝos ĉe ni nova uzina klubo kaj poste gvidos k-do.Gatrmaier el urbo Kroměříž. Post la kursfino ni fondos rondeton. Okaze de solena malfermo de uzina klubo ni arangos porpacan Esperanto-ekspozicion, kiun pruntesendos k-do.Zanáška el Kopřivnice. Ĉinajn pacafiŝojn ni pendigis sur uzina balkono.

MLADÁ BOLESLAV, La uzina klubo de R. O.H. AZNP ĉi-jare denove organizos unusemajnan kultur-rekreacion sub la kastelo "KOST". Riĉaj vesperaj programoj, dancado, prelegoj kaj ekskursoj tra la t.n.Ĉeĥa Paradizo. Ĉiuj partoprenontoj loĝos en hotelo kaj ĝuos 50% fervojrabaton. La kurso daŭros de 8/8 -15/8. Detalajn informojn petu ĉe: K-do.Kar.ŠOLC, Janáčkova č.566, MLADÁ BOLESLAV III.

GALANTA, /Slovakio/2 esp-istinoj hazarde ĉi tie kunvenis kaj fondis grupon. La filo de k-dino Valjanová instruas al 2 lernantoj de gimnasio kaj profesoro ankaŭ petis lernolibron. Ankaŭ inter geinstruistoj estas intereso pri Esp-o. Tre verŝajne ĉi 2 membra grupo baldaŭ disvastiĝos.

LIBEREC, laŭ informoj de k-do.Frant. Pytloun altaj funkciuloj de la fervojista sindikato malhelpas al ilia porpaca agado per rekomendoj en la kunvenoj kaj per informiloj, dediĉitaj al uzinaj kluboj, likvidi la Esperanto-rondetojn. Aliflanke li raportas, ke granda loka fervojista entrepreno decidis aliĝi al nia pro-testo kontraŭ la MACUKAŬA-afero en Japanio. K-do.Pytloun aliĝis kiel peranto de pacdefendantoj por la urbo Liberec, lia helpanto fariĝis k-do Jíra.

OLOMOUC, fondiĝis cigana Esperanto-klubo, kiun gvidas k-do.Mojmír Hanuš. Certe temas pri unua Esperantoklubo de Ciganoj en la mondo.

BRNO, okaze de la 37jara mortotago de d-ro LL.Zamenhof okazis la 14an de aprilo funebra koncerto kun prologoj pri lia vivo kaj verko en la Spegula salono de hotelo "Slovan".

DOLNÍ SUCHÁ, pere de lernolibro eldonita de Em.Klimsza memlernas du knaboj kaj unu knabino 13-14 jaraj kaj du virinoj nian lingvon. K-do. Klimsza mem ankaŭ diligente instruas.

Xčt. 01 - 5769-55

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

Unufoja publikigo de korespondanonco kostas 3.-Kčs aŭ 3 resp.kup. Ĉiu anoncanto estas devigata almenaŭ unufoje respondi al ĉiu proponanto.Eksterl.legantoj estas petataj helpi por akiri kontakton.

K-do.Václav PETEŘÍK,Ul.Pionýrů 5, PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio,pri turismo, filmo,interŝ.bildkartojn kun ĉ.l.
K-do.Bohumil HORÁK,Dvořákova č.31 PŘEROV,Ĉeĥoslovakio,/komencanto/. Kun junulаro el ĉiuj landoj,ankaŭ kun ĈSR per il.p.k.kaj leteroj.
K-do.Ivan TONČEV IVANOV,GORNO-BOTEVO,St.Zagorsko,Bulgario,kun ĉiuj landoj.
K-do.Waldemar STEMASZKO,Ul.Jagielonska 29,CIEPLICE SI,Polio, pri turismo,sporto kaj Esp. vivo.
K-do.Jaroslav KOTEK,/13j/Třída 1. maje č.89,PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio,interŝanĝas p.m.kaj il.p.k.kun ĉ.l.
K-do.Jan Škudera,Dukelské nám.27, PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio,interŝanĝ.p.m. kaj leterojn filat.afrankitajn.
K-do.Karel SUCHÁNEK,Mánesova č.12 PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio,per il.p.k.
K-do.DRAGAN K.Paliev,"Augusta Traiana"49,STARA ZAGORA,Bulgario,kun ĉiuj landoj.
K-dino.Kita SATORI,Esperanto Virina Asocio,Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku,OSAKA,Japanio,deziras kontakti kun virinaj societoj kaj kluboj el ĉiuj landoj pri paco, virinoj kaj infanoj.
K-do.Jaroslav MACHAČ,tipografo, K Dubině č.1215,PARDUBICE,Ĉeĥosl. kun ĉiuj landoj.Certe resp.
K-do.Robert FARAILL,41jaraĝa sindikata sekretario,sporta ĵurnalisto,17 Kajo Richelieue, BORDO, /verŝajne BORDEAUX/Francio,kĉl.
GRUPO DE PACAMANTOJ,praktikantaj Miĉurin-metodon dez.koresp.kun ĉ. landoj pri divers.spertoj,pri la flor-abel-kaj arb-kulturo.Skribu al la sekretario:Vanbreuse Georges -MA,CAMPIGNE en VERVIERS,Belgio.
K-do.Milan ŠTAIF,/19j/Máchova č. 606,STARÝ PLZENEC,Ĉeĥoslovakio, interŝ.il.p.k.kaj p.m.,kun ĉiuj l.
K-dino.Anna HONETSCHLÄGEROVÁ , Koperníkova č.21,PLZEŇ,Ĉeĥoslov. /komencantino/il.p.k.kun ĉ.land.
K-do.Inĝ.Otto Weinberg,U Redemtoiristů č.4,PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj per il.p.k.
K-do.Asen Ivanov DOČEV,pod 45280 STANKE DIMITROV,Bulgario,pri ĉiuj temoj kun gek-doj el tuta mondo.Certe resp.
K-dino.Marie ANDREEVA/20j./flegistino,Str."Ohrid"12,GOCE DELČEV Bulgario,kun gek-doj pri ĉ.temoj.
K-do.Josef KAMENÍK,Komenského 852 HULÍN,Morava,Ĉeĥoslovakio,koresp. per il.p.k.kaj let.,interŝ.p.m. kaj sportgazetojn kun ĉiuj land.
K-dino.Božena KAMENÍKOVÁ,Komenského č.852,HULÍN,Moravio,Ĉeĥosl. koresp.kaj interŝ.il.p.k.kaj modajn revuojn kun ĉiuj landoj.
K-do.Václav VODIČKA/19j.studento/ STARÝ PLZENEC č.176,Ĉeĥoslovakio, interŝ.il.p.k.,p.m.kaj pacgazet.
K-do.Adolf STAŇURA,Táborská č.42, OSTRAVA-Radvanice,Ĉeĥoslovakio, pri stenografio kun ĉiuj landoj.
K-do.Miroslav BARTOŇ,Čechova 1271 TURNOV II,Ĉeĥoslovakio,kun ĉiuj landoj kaj interŝ.il.p.k.
K-do.Ferenc ROZGONYI/gimn.stud./ Dimitrov 2,MEZOBERENY,Hungario, pri diversaj temoj.
K-do.Angel SE Koičec,Str.III,39, TREVNA,Bulgario,interŝ.il.p.k.
K-do.Dimitr.B.Marinov,Str.Silistra 4, RUSE,Bulgario,interŝ.p.m. kaj il.p.k.
K-do.Ivan Tončev Ivanov,Augusta Traiana 49,STARA ZAGORA,Bulgario.

## A T E N T I G O   P O R   E K S T E R L A N D A J   E L D O N E J O J

Nia redakcio povas rekompenci alsendon de eldonitaj libroj kaj broŝ. per liverado de samvaloraj jarabonoj al nia bulteno LA PACDEFENDANTO Ni akceptas en ĉiu nombro progresemajn kaj pacdefendajn eldonaĵojn.

Eldonis: Závodní klub-odbor ROH-ESPERANTO,TATRA,n.p.K O P Ř I V N I C E
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA,Palackého náměstí č.6, P L Z E Ň
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O